



Novjorka Prismo

Numero 112

Marto 2002

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia marta kunveno . . .

DATO: Vendredon, la 15-an de marto 2002, 6:30-9:00 pm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Rochelle F. Grossman gvidos diskuton pri
Esperantaj Proverboj Kompare Al Naciilingvaj.
Ĉiuj bonvolu konporti almenaŭ unu proverbon iulingvan. ★

Protokolo de la kunveno de la 15-a de februaro 2002

Je 7:05 pm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon. Ĉeestis 15 personoj, neniu el ili gastoj. La protokolo de la 18-a de januaro estis akceptata. Rochelle F. GROSSMAN komentis, ke la ĝusta nomo de la teatraĵo menciita en la artikolo de Nijl BLONSTEIN estas "Homebody/Kabul". Ŝi ankaŭ rimarkigis, ke ŝi neniam vidis la vorton "Manga", kiu aperis en la artikolo de Maki SANO. Oni klarigis al la grupo, ke "Manga" estas bildstria genro de japana literaturaĵo, ne adjektiva formo de la nomo de la frukto "Mango".

Tomaso menciis, ke li prezentos je dimanĉo prelegon ĉe alia societo pri la temo "Semiotiko". Li diris tion al ni, ĉar li fieras pri la oportuno, kaj ĉefe, ĉar pro la preparado, li ne havos tempon iri al la restoracio kun la grupo. Sofiya SOSKINA raportis, ke estas nun 46 plenaj membroj, kiuj jam pagis la kotizon por la jaro 2002, kaj estas ankaŭ 10 abonantoj de *Novjorka Prismo*. Rochelle menciis, ke ŝi ricevis leteron de iu, kiu proponis, ke ni faru publik-akcesan televid-programon por instrui Esperanton. Tomaso diris, ke personoj, kiuj volas partopreni en tia projekto, parolu al li. Sofiya cirkuligis al la ĉeestantoj karton, kiun ili povis subskribi, por gratuli la Esperanto-klubon de Peterburgo, Rusio, pri ĝia centjara datreveno. Tomaso menciis, ke gasto el Japanio alvenos venontsemajne, kaj personoj, kiuj volas renkonti la gaston, kontaktu Tomason.

Je 7:30 pm, Alex KARKOVSKY komen-

tra Esperantujo. Li parolis pri problemoj traduki, kiam oni provas komuniki kun grupo de personoj, kiuj ne parolas la saman lingvon. Li menciis, ke ofte, kiam oni tradukas ŝercon en alian lingvon, la personoj aŭskultantaj la tradukon ne opinias, ke la ŝerco estas amuza. Li ankaŭ parolis pri la misprononco de vortoj, ekzemple, ke rusaj esperantistoj povas emi prononci la unuaj aperoj de la litero "O" en "kokaĵo" kaj en "okcidento" kiel "A". Li parolis pri bone konataj kaj ne tiel bone konataj personoj, kiujn li renkontis.

Je 8:40 pm, la klubanoj diskutis pri kion fari dum la venonta kunveno. Oni proponis, ke ni diskutu pri esprimoj kaj en Esperanto kaj en aliaj lingvoj, kaj komparu tiujn, kiuj esprimas similajn ideojn

per malsamaj vortoj. Aliaj personoj menciis, ke ni povas ankaŭ diskuti pri la etimologio de Esperantaj vortoj, kaj ke ni povas laŭtlege ŝercojn kaj proverbojn en Esperanto.

Je 8:50 pm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Kvar personoj iris al la restoracio My Cousin Vinny por manĝi kaj trinki. ★

Protokolis: Stuart GREEN

Dues are due for 2002!

**Ĉu vi jam pagis
vian kotizon?**

K-marto

La 20-an de februaro pli malpli 9 geesperantistoj renkontiĝis en la restoracio ĉe K-marto. Japana esperantisto, Takatosi SOMEKAWA estis nia gasto. Ni parolis pri lia restado en Novjorko kaj pri libro pri la rusa poeto Yeroŝenko. ★

– Tomaso ECCARDT



Supre: Tomaso Leong, Alex Karkovsky, kaj Takatosi Somekawa ĉe K-mart. Dekstre: s-ro Somekawa kun lokaj samideanoj ĉe K-mart. (Fotis Maki Sano)



UEA/Novjorko

La 9-an de februaro mi ĉeestis tagmanĝon ĉe la sidejo de la League of Women Voters de la urbo Novjorko. Prelegis Eva Moskowitz, ano de la Urba Konsilio, distrikto 4, pri novaj perspektivoj de la Konsilio en 2002. LWV estis unu el la unuaj neregistaraj organizaĵoj (NROj) ĉe UN.

La 12-an de februaro mi ĉeestis tagmanĝon ĉe UN de la Association of Former International Civil Servants (Afics). Prelegis Barbara Crossette, ĵurnalisto de la *New York Times*. Ŝi klarigis pri kial ne estas pli da artikoloj en NYT pri diversaj projektoj de UN. Sekvis longa periodo de demandoj kaj respondoj.

La 13-an de februaro mi ĉeestis programon de la National Organization for Women (NOW) ĉe la urbodomo de Novjorko, kie oni prezentis la 23-jaran Premion Susan B. Anthony. I.a., ricevis la premion grupo de virinoj, kiuj laboras en netradiciaj postenoj (policianoj, fajrluktantoj, ktp), kiuj helpis je 9/11 ĉe WTC. Tiuj virinoj klarigis precize kion ili faris kaj fakte inspiris plori multajn aŭskultantojn.

La 14-an de februaro mi ĉeestis programon ĉe UN de la NRO Committee on Ageing/NY, kunlabore kun diversaj oficoj de UN kaj la Monda Banko. Post la bonvenigaj vortoj de Thérèse Gastaut de la Departemento de Publika Informado de UN, kaj de Gillian Sorenson, kiu legis mesaĝon de Kofi Annan, la ĝenerala sekretario de UN, prelegis amb. Inocencio Arias (Hispanio) kaj Julia Alvarez (Dominikana Respubliko). Oni montris videbendon kun NRO reprezentantoj de Ĉinio, Srilanko, Kenjo, Aŭstrio, Hispanio, kaj Svisio, kiuj klarigis siajn prioritatojn por la naciaj reprezentantoj ĉe la World Assembly on Ageing (Madrido, aprilo 2002).

La 7-an de marto mi reprezentis ELNA-n ĉe eleganta tagmanĝo ĉe UN de la United Nations Development Fund for Women (Unifem). Nane Annan, la edzino de Kofi Annan, parolis pri la virinoj de Afganistano. Mary Robinson, la Alt-Komisiito pri Homrajtoj, sendis video-mesaĝon (lastmomente ŝi devis resti en Ĝenevo). Prelegis Swanee Hunt, usona ambasadoro al Aŭstrio en 1994 kaj nun profesoro ĉe Harvard Universitato. Ambasadoro Hunt entuziasme parolis pri la laboro de Unifem. ★

— Rochelle F. GROSSMAN

IBM Plaza

La 3-an de marto, ses geesperantistoj kunvenetis ĉe Sony Plaza. Ĉar mi erare menciis Sony Plaza en mia epŝta anonco, ni ne iris al IBM Plaza kiel planite. Ni diskutis pri lingvoj, precipe la rusa, kaj ni decidis klopodi venontmonate uzi IBM Plaza, ĉar tiu estas malpli da bruoj, nur la bela mallaŭta sonoj de birdoj. ★

— Tomaso ECCARDT

Somera kursaro okazos en Vermonto

La somera kursaro (antaŭe ĉe SFSU) okazos ĉi-jare en Vermonto (vidu mal-supre). ★

— Tomaso ECCARDT

Bona novaĵo por ni en tiu ĉi parto de la kontinento, ĉu ne? Mi volis plusendi la anoncon al vi, por ke, se vi ne jam ricevis, vi povu sendi ĝin al interesatoj en via regiono. Felician kaj sanan novan jaron.

— Jacob B Schwartz

After 43 years in San Francisco, NASK is moving! In 2002, the courses will be hosted by the world-famous intercultural School for International Training (SIT), in the northeastern US. Together with professionals from the school, our instructors will evolve a new and inspirational study program which emphasizes the use of Esperanto for intercultural communication and cooperation.

Dates: July 8-26, 2002

Location: Brattleboro, Vermont (easily reachable from Boston, New York, or Hartford)

Instructors: Dr. I. Koutny (Hungary/Poland), Dr. A. Melnikov (Russia), Dr. R. Resende (Brazil)

Costs: Lodging in a 2-bed room with meals, US\$640; course fee, US\$900; stipends are available.

For more information about SIT:

<http://www.sit.edu>

For more information about the courses, write to Ellen Eddy at

eddyellen@aol.com

For those that don't know, NASK (North American Esperanto Summer Courses) is a summer program that has been held in San Francisco for several decades and which attracts an international group of students and instructors.

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Marto

15

ESNY KUNVENO

Esperantaj Proverboj
Kompare Al Nacilingvaj.
Vendredon, 6:30 p.m. ĉe LIFT.

Aprilo

7

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 p.m. ĉe **IBM**
(Limdato por kontribuajoj por *Prismo* 113)

ESNY KUNVENO

19

Vendredon, 6:30 p.m. ĉe LIFT

United Federation of Teachers (UFT)
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

Not only are the courses taught entirely in Esperanto, but outside of class, students eat meals and live together, go on site-seeing excursions together, participate in evening activities presented in Esperanto, etc. And with an international group, students have more incentive to use Esperanto rather than reverting to their native languages. The internationality also helps make the experience that much more enjoyable – it's like a little international Esperanto gathering without having to travel to Europe! When the courses were held in SF, they were able to draw many Asian participants. I don't know how the change to the east coast will affect things, though maybe we'll see more European participants. Certainly the benefits of being at a school for multicultural and intercultural studies are great. I look forward to seeing what blossoms from the cooperation between the Esperanto organizations and the School for International Training. Oh, and if you'd like to go, but are concerned about the price, know that financial aid is available. Contact Ellen Eddy for information on stipends. ★

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Stuart Green
(631) 751-5683

Vicprezidanto
Thomas Leong
(718) 981-4252

Kasistino
Sofiya Soskina
(718) 671-5699

Program-Direktoro
Arturo Bonetti
(718) 257-6091

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com

© 2002 Esperanto Society of New York

Novjorka Prismo

Numero 112 – Marto 2002
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>